FN PER ANC 4+

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL
= = = =
TRIMONATA BULTENO

N° I50à AUTUNO I984 (n° 65a nova serio )

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. N° 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 20Fr. Subtena = ek de 30 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco = 20 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

## ĜENERALA KUNVENO EN BAYEUX

Sur la Somera numero de la bulteno, vi povis trovi mapon kiu indikas al vi la lokon kie okazos nia Ĝenerala Kunveno : Centre d'Accueil Municipal, Chemin du Bois de Boulogne , Bayeux . Ni esperas ke vi zorge notis la daton, 6an kaj 7an de Oktobro , kaj ke vi ĝustatempe resendis vian aliĝilon ...

Al la provizora programo, ni povas aldoni :

Sabaton vespere : a) vi havos la plezuron spekti nekutiman spektaklon : Ombro-teatron ( legu prezentadon aliloke )

b) JO BERGEON , el Parizo, ĉarmos nin per gitaro kaj kantoj .

Dimanĉon matene : la Labor-Kunveno ; ĝi estas la jara okazo porĉiuj , traserĉi kio estas farenda por antaŭenigi la Movadon en Normandio, proponi plibonigojn en la funkciado de la "motoro" de nia Unuiĝo . Jen la tradiciaj erojtiam traktotaj : alparolo de l'Prezidanto
agadraportoj de la Grupoj
financa raporto
bulteno
elektoj de la Komitato (eliranta triono S-roj E.Jouis P.Pottier)

Sed, krome, projektoj studotaj : I) Esperanto-Tago en Domfront ( legu iom pri tio en la rubriko "Vivo de la Asocioj "

2) Tra Normandio, bicikle ( bonvolu legi la alvokon de Y.Nicolas)


Al tio aldoniĝos viaj propraj proponoj kaj ideoj : preparu ilin surpapere, streĉu la cerbon ! kaj... ĝis baldaŭ en BAYEUX !

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais
Le Gérant : Pierre LEMARCHAND - Dépôt Légal 3ème trimestre I984

# HASTINGS

## spektaklo de la ombroteatro "la kukurbo„



# H A S T I N G S

En Bayeux, la Batalon de Hastings vi vidos tapiŝe... kaj teatre !

Ne nur la Reĝino Mathilde pritraktis la venkon de Guillaume, sed ankaŭ Sro LECUCQ, respondeculo de la ombroteatro de Caen "La Kukurbo".

Sendube, la du rakontoj, ĉerpitaj el la sama evento, tute malsimilas, sed minimume unu aspekto estas komuna : la kvalito. Lecucq, movigante papero-rolulojn arte desegnitaj de Alain LETORT, konstruis vivantan kaj vidindan teatraĵon.

Originale verkita en la franca lingvo, "Hastings" estis tradukita en esperanton por partopreni festivalon de pupteatro, lastjare en Jugoslavio. Okaze de tiu festivalo, Lecucq gajnis premion.

Neniu parolo, nur muziko kaj tekstoj. Tiel, la aŭtoro pli bone reliefigas la aktorojn kaj iliajn movojn. Unuvorte, li renaskas tute malnovan arton, malbone konata, preskaŭ forgesita en niaj landoj okcidentaj, sed vidinda same kiel la kino, aŭ la teatro.

Ĝis nun, en Francio, neniu esperanta grupo spektis "Hastings"(n) la Normandoj, do, estos la unuaj. Ni estas certaj ke ĉiuj inter ni, infanoj kaj plenkreskuloj, ĝin ŝatos.

Ĝis Oktobro !



## TRA NORMANDIO PER BICIKLO

Nia regiono estas bela, la vidindaĵoj multaj, kaj ne pluvas ĉiam !
Certa mi estas ke ĝi plaĉus al iuj vojaĝemaj eksterlandanoj .

Mi proponas ke ni organizu biciklan iradon, ekzemple, de Rouen ĝis Le Mont St Michel, mondfama turisma loko. Tiele, la plej belajn monumentojn, pejzaĝojn, oni povus montri ... kaj malkovri ni mem !

Projektante tion, kion mi celas ?

I) Krei agadon inter ni, por vigligi la vivon de nia Asocio.

2) Konigi nian regionon, kaj nian Asocion al la internacia movado . Fakte, Esperanto ne estas lingvo nur por interligi Normandojn, sed ankaŭ ebligi komunikadon inter la normandaj esperantistoj kaj la aliaj, t.e. tiuj kiuj loĝas en la tuta mondo ! Niaj eblecoj por organizi iun ajn festivalon internacian estas nulaj pro manko de mono ... sed ni ne estu modestaj ! Malgraŭ nia malgrandeco nian regionan asocion la tuta mondo devas koni ! Cetere, la vojaĝmaniero ( bicikli, tendumi ) malmulte kostus, kaj mi opinias ke pro tio, la partoprenantoj estus sufiĉe multaj .

3) La alveno de diversaj naciecoj per Esperanto estus bona propagando ĉe la loĝantaro de nia regiono .

Jen la afero ! Nun mi atendas la volontulojn kiuj estus pretaj pristudi ĝin por somero I985 . Kion opinias la estraro pri tiu propono ?

Skribu rapide por ke ni prezentu taŭgan projekton al la anaro okaze de la Ĝenerala Kunveno kiu okazos la 7an de Oktobro en Bayeux .

Mia adreso : Nicolas Yves
I7-37 Quartier du Bois
I4200 Hérouville St Clair
Tel. (3I) 95.II.8I

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

**NI FUNEBRAS** La Grupo en Le Havre estas en granda ĉagreno , pro la perdo de unu el siaj fidelaj membroj : nia bona amiko Raymond CARON , patro de nia sekretariino Silvia, mortis la I7an de Julio, post longa malsano . La Grupanoj, kaj multaj normandaj Samideanoj longe memoros lian trankvilan bonhumoron , lian helpemon dum organizado de kunvenoj, lian konstantecon . Al Sinjorino Caron , al Silvia kaj Laŭrenca iras niaj sinceraj kondoleancoj.

Nia amiko P.BRIET havis la doloron perdi sian edzinon post plurjara malsano ; li akceptu niajn amikajn sentojn .

=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=:=

**NATUR-AMIKOJ** Ĵus aperis la jubilea numero I00 de la revuo "La Migranto " . Belaspekta, kun kolora kovrilo, ĝi enhavas duoblan amplekson ( 32 paĝoj )
La Havra Sekcio de la Naturamikoj fieros legi en ĝi artikolon pri sia agado okaze de la arbo-tago : " Por ĉiu bebo, unu arbo "
Ekzemplero de tiu revuo estas havebla kontraŭ 3 internaciajn respondkuponojn al : TANEF , Postfach 225, CH-4003 Basel, Svislando .

## NIA VIVO en R O U E N

Vendredon, la 4an de Majo, en la M.J.C., ni povis ĝui la anoncitan spektaklon : " BABEL AUJOURD'HUI ". Kvardeko da spektantoj, el la Grupo kaj Regiono, kaj kelkaj el aliaj urboj de Seine Maritime ... Temas pri franclingva teatraĵo, kiu celas informi pri Esperanto. Skeĉoj humuraj sinsekvas por rakonti la aventurojn de Christian Babel, kiu suferas pro neeblo komuniki kun eksterlandanoj, eĉ kun sia angla edzineto !
Subtilaj aludoj je la historiode la Internacia Lingvo kaj de ĝia kreinto . Lerta elmontro de kelkaj eroj el la lingvo helpas al la atentigo de la publiko, kaj pretigo por la debato, kiu sekvis sub la dokumentoplena gvidado de nia amiko Petro Lemarchand .
Kvankam tiu prezentado ne estas destinata al Esperantistoj, tiuj povas tamen kun profito, pluki el tiu scenaro novan dinamikon kaj ideojn por informado . Oni povas nur bedaŭri ke la ĉeestantaj Samideanoj ne sukcesis kuntiri pli da konatulojn el la ekstermovada publiko . En la enireja halo, abunda ekspozicio kun freŝdataj dokumentoj kaj libroj , helpis je konkludigo de la diskutoj .

-:-:-:-:-:-:-:-

## NIA VIVO en LES ANDELYS

Responde al invito de la Grupo, trideko da Samideanoj ĉe-estis en la " Jugoslavia Posttagmezo " dimanĉon la 25an de marto. Juna Jugoslavino, Saŝa Ŝirovec, prezentadis lumbildojn pri sia lando, kun lertaj komentoj. Ŝi samtempe informis pri la situacio en sia lando , kie Esperanto prosperas. Gustumo de specialaĵoj el la regiono estis ankaŭ momento agrabla, kun kukoj, krespoj , kaj jugoslavaj vinoj .

-:-:-:-:-:-:-:-

## NIA VIVO en L E H A V R E

La Monataj Kunvenoj agrable disvolviĝas kun atentema aŭskultantaro (I6 personoj meze) laŭ la antaŭviditaj temoj : ĉiam instruaj, kelkfoje instigaj al manĝemo, kun ĉi jare la partopreno de Polino, kiu parolis pri sia lando .
Monata Deĵorado akcepto de vizitantoj la unuan vendredon de ĉiu monato, II rue Palfray je la I8h30 . Ĝi permesis kelkajn kontaktojn, interalie kun S-ro E.Lorin, kiu provos krei Esperanto-fakon en la Kultura Fervojista Asocio de Le Havre, kies vic-prezidanto li estas .
Vizito de du anglaj Samideanoj el Sotono kiuj, trapasante nian urbon, estis gastigataj de la Familio Caron

Le Havre ( sekvo)

Propagando Dank'al klopodoj de Alain Chalm, nia amiko Paŭl Mary povis prezenti Esperanton al klaso de eksterlandaj infanoj, en Havra lernejo . La rektmetoda informado estis sukcesa antaŭ tiuj geknaboj, kiuj jam spertis la problemon pri komunikado .

-:-:-:-:-:-:-:-

## NIA VIVO en C A E N

La 24an de Marto, estis agrable retroviĝi inter nordaj kaj sudaj genormandoj : 25 gesamideanoj kunvenis en la kutima simpatia etoso ,antaŭ bongusta manĝo, ĉe la Stacidoma Restoracio. Poste, en la kunvenejo de la Grupo, S-ro Angenault konigis la vizito-programon :
La Kastelo, fortikaĵo kiun konstruigis Vilhelmo la Konkeranto, en la XIa jarcento ; promenado sur la altaj remparoj, de kie ni povis admiri la tutan urbon , kaj precipe la sonorilturojn. - La preĝejo Sta Petro, konstruata de la XIIa ĝis la XIVa jarcento, kiu suferis dum la milito, en I944, pro obuso kiu detruis la sonorilturon, nun fidele rekonstruita. Poste, butikumo tra la piedirantaj stratoj donis al ni ideon pri la vivanteco de tiu kvartalo .

Koran dankon al la organizantoj !

-:-:-:-:-:-:-:-

## NIA VIVO en D O M F R O N T - F L E R S

" E s p e r a n t o - T a g o I 9 8 5 "

Dum inaŭguro de la nova biblioteko urba de Domfront, la Esperanto-Grupo tie, konsente kun la urbestro, preparos ekspozicion pri Esperanto dum tiuj tagoj (dato ne ankoraŭ fiksita ). La sama ekspozicio povus profite esti prezentata en Flers, kie , ankaŭ, favoras la urbaj instancoj, kun akcepto de la loka Radio . La Grupo en Domfront pensas je la ebleco kunordigi tiujn du aferojn, kaj organizi " Esperanto-tagon " kiu povus gasti la Ĝeneralan Kunvenon en I985 ; kromaj aktivecoj, informoj aŭ propagando povus esti preparitaj por tiuj tagoj . Nia amiko Gaston Véron tre esperas ke la venonta Ĝenerala Kunveno en Bayeux pristudos tiun proponon, kaj kontribuos en la preparo de la programo .

-:-:-:-:-:-:-:-

## Junulara Esperantista Franca Organizo

kunvenos apud Montélimard, la 29an kaj 30an de Septembro por "Cerbuma Semajnfino " ĉiu juna Esperantisto partoprenu la debaton pri la estonteco de la Junularaj E-o Movadoj : kontaktu rapide kun Daniel DOYE 75 Bard du Montparnasse - 75006 Paris Telefonu vespere : (I6) I.544.6I.67.

-:-:-:-:-:-:-:-

## SALUTOJ DE NORMANDOJ EL EKSTER NORMANDIO .

Kiam, je pli ol I 000 km el Normandio, 4 Normandoj renkontiĝas ...

Fine de Aprilo, okazis en St.Raphaël, sur la lazura marbordo, la Printempa Fervojista Kunveno. Tie renkontiĝis 90 partoprenantoj el ĉiuj partoj de Francio. Inter la organizantoj estis du eks Normandi-anoj, kiuj renkontis du Havr'anojn ĉe kiuj la edzo lernas esperanton en Le Havre.

Kompreneble, ili rapide interŝanĝis novaĵojn el Normandio kaj ... iom krokodilis.. sed multe plaĉis al ili la restadon sur la lazura marbordo . Kiel kutime, dum aliaj renkontoj,ni promenadis en la regiono : Gorges du Verdon - Port Grimaud - la Provenca Venizio - St. Tropez - vizitoj de St.Raphaël kaj de la apuda romana urbo Fréjus . Dum la lasta tago, okazis ŝipekskurso laŭlonge de la Ora Korniĉo, bedaŭrinde, la vetero ne estis bela sed, malgraŭ averto de la ŝipestro, 50 personoj enŝipiĝis (kelkaj rezignis) ĉar, kompreneble, la ŝtormoj ĉi tie ne estas la samaj kiel tiuj de la Manika aŭ Atlanta maro ... tion ili pensis ! sed, ve ! post duonhoro da krozado, kelkaj jam estis malsanaj, kaj la moveco de la ŝipo ne estis agrabla... rezulte, la promenado daŭris nur unu horon, anstataŭ du kaj duono kiel antaŭvidite !

Jen kelkaj informoj pri du eks-Ruenanoj, nun loĝantaj en la sudo ; ili estis "baptitaj" esperantistoj en Rouen, kaj nun provas semi en St Raphaël

Se eventuale vi trapasas tiun urbon, telefonu al ili (94) 95.IO.OI. kaj kun plezuro, ni interŝanĝos Normandan kaj Provencan informadon ... ... en Esperanto !

Plej sinceran memoron

Denise kaj André LOISEL eks-Ruenanoj

- o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o - o -

**ESTRAR-KUNVENO** en Ver sur Mer (26a de Februaro)

Ĉe Ge-sroj Angenault retroviĝis II gesamideanoj normandaj, ĉu membroj de la estraro, ĉu membroj observantoj .
Pro la neeblo okazigi la Ĝeneralan Kunvenon dum Marto en Bayeux, la organizantoj klopodos organizi ĝin por la 7a aŭ I4a de Oktobro ; sed la aliĝiloj devus atingi la organizan komitaton sufiĉe frue. Por iom kompensi la manko de tiu renkontiĝo, S-ro Angenault invitas al Taga kunveno en Caen la 24an de Marto , kaj la Grupo en Les Andelys al Jugoslava posttagmezo la 25an Marto.
Bulteno S-ro Gibaux ŝatus anstataŭanton por la redakta tasko : problemo ne solvita . Gilbert Bettencourt zorgas pri la kompilado de la adresaro, kaj eldono de memgluaj etikedojpor la bulteno , dank'al komputilo . Diskuto pri la presado de frontpaĝoj . Nova ebleco koncerne la multobligadon de la bulteno estas studata de Katerina. Nuna sendokvanto : 270 ekzemplerojn .
La nereguleco de la aperigo de N.E.B. kaŭzis protestojn kaj kritikojn de membroj kiuj rimarkigas ke tio povus esti unu el la motivoj de la fiasko de la antaŭvidita Kongreso en Herouville .
Asocioj : ni kun ĝojo bonvenigas la naskiĝon de nova asocio : Groupe Esperanto de la Région Rouennaise .
S-ro Gaston Veron el Domfront donacis kolekton de libroj kaj revuaroj al UNE.
La Teatro-trupo "La Chrysalide" sciigas ke la spektaklo " Babel Aujourd'hui" estos prezentata en Rouen en la komenco de Majo .

- o - o - o -

**ESTRAR-KUNVENO** en Grand Quevilly (23a de Junio)

Ĉe-estas Ge-anoj : Angenault,Caron,Gaillard,Gibaux,Jouvin,Nicolas, Pottier, Quillaud.
Bulteno la venonta (n° I49 Somero) kunportos la aliĝilon por la Ĝenerala Kunveno en Bayeux ; ĝi estu ekspedata en la unuaj tagoj de Julio.
Katerina prizorgis la eldonadon de frontpaĝoj .
Ĝenerala Kunveno : la organizantoj kontaktas la kompanion "La Citrouille" kiu havas spektaklon de ombra teatro pri la Batalo de Hastings .
Katerina traktas kun la kanzonisto Jo Bergeon .
Propagando : respondeculo de entrepreo-komitato el Paluel estas interesata pri Esperanto . La Grupo " Unesco" el la C.E.S. el Maromme akceptos membrojn de la Ruena Grupo por prezentado de Esperanto. S-ro P.Lemarchand estis intervjuita de la loka radio FMR.S-ro Nicolas proponas biciklo-iradon tra Normandio .

- o - o - o -